

## **Sciencon por la praktiko, praktikon por la scienco:**

### **Ĉu ŝanco enkonduki Esperanton en ĉinajn lernejojn?**

**Prelego por Strategia Forumo ĉe la 89-a UK**

**Liu Haitao**

Laŭ la nova PIV (NPIV), Strategio estas “arto kombini rimedojn por trafi iun celon”. Do, se ni volas fari ion strategian, ni almenaŭ devas koni la rimedojn jam posedatajn, kaj pli grave: la trafota celo devas esti klare fiksita. Tamen, la mondo senĉese ŝanĝiĝas. En tiu ĉi situacio oni bezonas kompreni kio okazas, kio influas aŭ ŝanĝas nian celon, pli grave, ĉu kaj kiel oni devas alĝustigi la rimedojn por adaptiĝi al la ŝanĝema mondo. Por klare koni celon kaj rimedojn, por atingi pli bonan praktikon, ni bezonas iun helpon, kiu gvidu kaj klerigu nin. Tio estas teorio. Jen la ĝenerala regulo en la mondo, kiu ankaŭ validas en Esperantio.

Interlingvistiko povas doni bonan teorian fundamenton, por plialtigi la kvaliton de multaj agadoj de la Esperanto-movado kaj helpi solvi problemojn. Ĉar ĝi estas scienco pri internacia lingva komunikado, kun ĉiuj siaj rimedoj, kondiĉoj, efikoj kaj kun ĉiuj aspektoj. Ĝi ankaŭ estas scienco kiel optimumigi la internacian lingvan komunikadon per planlingvoj. El ĉirkaŭ 1000 planlingvaj projektoj, laŭ socilingvistikaj kriterioj Esperanto fariĝis la sole multflanke funkcia planlingvo. Tio kreis novan branĉon en interlingvistiko – esperantologion. La studobjektoj de tiuj sciencoj kaj teorioj kredigas nin, ke interlingvistiko estas teoria bazo de la Esperanto-movado, ĝi estas grava kaj necesa kaj utila por fari taŭgan strategion por la Esperanto movado.

La praktiko de Ĉina Esperanto-movado montras ke Esperanto estas utila en multaj kampoj, ĝi iam kontribuis por la reformo de la ĉina lingvo, por la liberigo de la nacio, por pli bona interkomunikado kun la popoloj de aliaj landoj. Tiujn spertojn oni devas resumi por atingi pli brilan estontecon de Esperanto. Ni konsideras ke la kialo de la iama sukceso de Esperanto en Ĉinio estas, ke ĝi montriĝis taŭga rimedo kaj sin metis en la servon por la ĉina socio.

Jen estas du ĉefaj flankoj:

1. Per Esperanto Ĉinio povis atingi la pli multajn landojn, kiuj interesiĝis pri la ĉinaj aferoj, kiujn oni ne facile atingis per aliaj pli ‘grandaj’ lingvoj. Ĉinio volis interkomuniki kun tiuj landoj. Tio estis unu el gravaj celoj de la ĉina diplomatio.
2. Esperanto allogis ĉinojn ankaŭ per la “interna ideo”, aŭ pli precize, per la internaciisma idealo. Internaciismo iam estis grava integra parto de la ĉina politiko. Tial, ne estas malfacile kompreni, kial la ĉina registaro subtenas Esperanton eble pli ol aliaj landoj.

La historio diras al ni, ke taŭga internacia lingvo devas esti neŭtrala, tamen tio ne signifas ke la parolantoj de la lingvo devas agi neŭtrale. La neŭtrala lingvo

ankaŭ devas kontribui al la progreso de la lando. Alidirite, la neŭtrala planlingvo akirus la subtenon kaj evoluadon de la registaro, nur se ĝi povas prezenti siajn konkretajn valoron kaj utilon al la socio. La sperto estas ega kontribuo de ĉina Esperanta praktiko al esperantologio kaj interlingvistiko, ĉar unu el la ĉefaj temoj de interlingvistiko estas esplori, kiel planlingvaj projektoj povas sukcese ensociiĝi.

Hodiaŭ la situacio ŝanĝiĝas. La tutmondiĝo, aŭ pli precize, la usoniĝo, freneze balaas la tutan planedon. Tiuj, kiuj rezistas la usonecan tutmondan kulturon, estos izolitaj de la monda ekonomio. Ne estas malofte, ke ni aŭdas la diraĵon 'en la tutmondiĝa hodiaŭo la maluzado de la angla estas plej granda malŝparaĵo'.

Ekde ĝia naskiĝo Esperanto estas lingvo memvole elektita de ĝiaj parolantoj. En tiu ĉi signifo Esperanto estas popola movado, desuba movado. La tutmondiĝa ondego devigas ke ĉiuj konsideru siajn agadojn sub la premoj de ekonomiaj utilcelaj fortoj. Nun la Esperanto movado, esence bazita sur idealismo, ne plu tiel altiras la homojn kiel antaŭe. Tio estas fakto. Se Esperanto ne povas alporti al la lernantoj la bonaĵojn kompareblajn kun aliaj etnaj internaciaj lingvoj, ĝi fariĝos krize seninteresa lingvo. Atentindas, ke oni ne povas sammaniere savi Esperanto, kiel por savi minacatajn etnajn lingvojn. Por etnaj lingvoj oni kutime mezuras la gradecon de danĝero, vidante ĉu ankoraŭ ekzistas sufiĉe da geknaboj denaske lernantaj ĉi lingvojn. Sed ĉe planlingvo, unuavice oni devas gardi la neŭtralecon de la lingvo.

Ŝajnas al mi, la ebla savilo estas enkonduki Esperanton en nacian edukan sistemon. Ekzemple, en la nuna sistemo de ĉina fremdlingvo, la lernita fremdlingvo apenaŭ estas ilo de interkomunikado, kaj la fremdlingvo mem jam fariĝis la scio por taksi la homojn. Se la celo por lerni la lingvon ĉefe estas por sukcese trapasi la ekzamenojn, ĉefe ne por interkomuniki kun aliaj homoj, tiam evidente oni ŝatas la lingvon, kiu povas esti facile regata kaj lernata. Por azianoj kaj ĉinoj Esperanto certe estas pli facile lernebla ol la angla. Tio donus la eblon ke Esperanto estu akceptita de ĉinoj, kiuj urĝe bezonas trapasi la ekzamenojn por pli bona profesia kariero kaj pli alta akademia grado. Nun Esperanto rajtas funkcii kiel la dua fremdlingvo en multaj kampoj en Ĉinio. Se ni povas antaŭiri iomete, nome agnoskante, ke Esperanto havas la saman lokon en la eduka sistemo kun aliaj fremdlingvoj. Kvankam kiel internacia komunikilo Esperanto ne estas komparebla kun la angla, tamen Esperanto kapable plifaciligas la akiron de la scioj, kiujn la ekzamenatoj devas posedi. Esperanto sendube estas pli bela ol la angla en la okuloj de la ekzamenatoj. Per kurba vojo oni povas fari pli multajn parolantojn de Esperanto, tio ege kreskigas la komunikan forton de Esperanto.

Evidente, se Esperanto povas eniri la edukan sistemon de Ĉinio kaj aliaj landoj kiel la normala fremdlingvo, ni urĝe bezonas la instruistojn de Esperanto, kiuj devas esti same kompetentaj kiel tiuj por aliaj lingvoj. Tiuj ĉi instruistoj nepre devas esti trejnataj en universitatoj. Oni devas starigi Esperanto-fakon en universitato. Se tio okazus, oni ankaŭ devas fondi

esplorojn por esperantologio kaj interlingvistiko. Ĉar neniu fako rajtas ekzisti sen firma teorio kiel fundamento.

Kiam ni revenas el la ideala mondo al la realeco, ni trovas ke la realo estas serioza: interlingvistiko kaj esperantologio apenaŭ aperas en gravaj ĉinaj sciencaj verkoj. En Ĉinio bedaŭrinde ankoraŭ ne ekzistas sufiĉaj studoj kun scienca nivelo, kiuj estas necesaj por akiri subtenojn de sciencistoj, precipe de lingvistoj, konsiderante ke interlingvistiko funkcias kiel branĉo de lingvistiko. Estas malfacile trovi klaran subtenon de gravaj lingvistoj por Esperanto. Por ĉiuj farendaĵoj, oni bezonas la subtenon el la praktiko, do, de ĉina Esperanta-movado. Pro tio estus tre konvene, se ĈEL kaj aliaj Esperanto-organizaĵoj estonte pli forte interesiĝu pri la sciencaj aspektoj de Esperanto kaj de internacia lingva komunikado ĝenerale.

Sendube, en nuna situacio, kiam eĉ la registaroj aŭ internaciaj organizaĵoj donus al Esperanto pli altan lokon, ni ankaŭ ne kapablas plenumi la taskon kaj uzi la ŝancon. Tio ne nur estas problemo por Ĉinio, ankaŭ preskaŭ validas en la tuta mondo. Alie, por akiri la subtenon, oni ankoraŭ devas multe konvinki kaj argumenti, tio certe postulos sciencajn subtenon el interlingvistiko. Por plibonigi la situacion, se ni povas:

1. publikigi bazajn verkojn pri interlingvistiko kaj esperantologio;
2. okazigi interlingvistikajn kolokvojn, kiel ili okazas en diversaj landoj;
3. fondi iun organizaĵon pri interlingvistiko, iom simulfunkcia kiel la germana Societo pri Interlingvistiko (GIL)<sup>1</sup>;
4. inviti eksterlandajn specialistojn por prelegvojaĝoj;
5. sendi ĉinajn specialistojn al eŭropaj interlingvistikaj centroj por tie studi;
6. instigi la studentojn verki diversnivelajn disertaciojn pri interlingvistikaj temoj en ĉinaj universitatoj;
7. enkonduki interlingvistikon kiel universitatan studobjekton en lingvistika fako.

Por plenumi tiujn ĉi taskojn, diversaj subtenoj, financaj kaj politikaj kaj aliaj, el diversaj landoj kaj kanaloj, estas postulitaj. Tamen, ĉiuj estas farindaj kaj fendaj, ĉar tio ege utilas la evoluadon de Esperanto.

---

<sup>1</sup> <http://www.interlinguistik-gil.de>